**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MAJO 2002**

**EXPOLINGUA 2002**

Jam la kvaran fojon Esperanto estis montrata en ĉi lingvo-foiro, de la 11ª ĝis la 14ª de aprilo en Casa de Campo, Madrid. Nia budo estis triangulo dumura, kies tria flanko permesas la aliron de la publiko. La budo havis etan bretaron kaj montrotablon, do, ne granda spaco por eksposicii, kiu devigis nin draste redukti la kvanton de materialo. Kiel novaĵo ni prezentis haste pretigitan flugfolion pri ĉiaspecaj esperantaj TTT-ejoj, surbaze de simila informilo "Esperanto-Panoramo", aranĝita de la franca junularo. Ne eblis organizi loton surbaze de la ludotesto, sed per minimuma manipulado tiu flugfolio aliiĝis en plian informilon. Denove Esperanto vekis intereson, surprizon, kaj eĉ rifuzon -kial ne diri- inter la publiko; sed estas ja pozitiva atingo, ke serioza entrepreno kia *Fundación Actilibre*, kies tasko estas organizi seriozan eventon movantan tiom da mono kaj da homoj, konsideras Esperanton inda je ĉeesto tiukadre.

**ESPERANTO EN AMASMEDIOJ**

*(El País 2002-02-28)* En la nekrologo de la brita verkisto Spike Millogan aperas jena kiel unu el liaj plej konataj frazoj "Mi parolas esperanton kvazaŭ denaskulo." (Hablo esperanto como un nativo)
*(Libertadigital 2002-03-25)* EU refuzis esperanton kiel labor-lingvo por solvi lingvajn problemojn en institucioj okaze de la aldono de novaj ŝtatoj kiel membroj. La komisiito pri Administra Reformado asertis ke "kvankam la uzado de esperanto povas estis alloga je unua vidpunkto, profunda ekzameno montris ke ekzistas praktikaj, financaj kaj teknikaj malfacilaĵoj por ĝia uzado" kaj ke "lingvo kiun oni ne uzas en la ĉiutaga vivo povas kunporti riskon ne esti kapabla komuniki ideojn aŭ kompletajn mesaĝojn kiuj aperas en kunveno".

**GRANDA VORTARO DE FERNANDO DE DIEGO**

La elstara esperantisto, eks-akademiano, tradukisto de verkoj kiel "Don Kiĥoto" de Cervantes, de verkoj el García Lorca, Antonio Machado, ktp, verkis grandegan kaj unikan vortaron hispana-esperanto, kun pli ol 50.000 enirvortoj, kun amaso da klarigoj, sinonimoj, faritaj frazoj, ktp, tute nemalhavebla por esperantistoj. La eldono estas tre multekosta, pro la grandeco de la libro, kaj pro tio oni bezonas la kunlaboron de oficialaj kaj privataj instancoj, de e-asocioj, kaj de unuopuloj. Ĉiu financa helpo estas bonvena, eĉ antaŭmendoj de privatuloj, po 25 eŭroj plus sendokosto ĉiu ekzemplero. La vortaro, tute unika en nia movado, ampleksas ĉirkaŭ 1.200 paĝojn (tre simila en ĉio al Plena Ilustrita Vortaro). Interesiĝantoj bonvolu kontakti Grupo Esperanto de Valencia. Retadreso: augustocasquero@infonegocio.com
La aŭtoro mem ne postulas ian financan kompenson, kaj same ĉiuj kunlaborantoj. Ne ekzistas komercaj celoj, nur la deziro aperigi tiun nemalhaveblan esperantan monumenton, kiel omaĝo al Fernando de Diego. Dankon al ĉiuj anticipe: Augusto Casquero.

**ALIA NOVA VORTARO**

Finiĝis la revizio de la vortaro kataluna-esperanto, en kiu kunlaboris diversaj katalunaj samideanoj. La vortaro konsistas el pli ol 10.000 kapvortoj kaj atendas mecenatecon kaj financadon por ĝia eldono. *(KAE nª 38)*

**MONDA UNIVERSITATO**

Invitite de Brazila Esperanto-Ligo, D-ro Adonis Marcelo Saliba Silva akceptis la taskon kunordigi laborgrupon por ellabori projekton pri virtuala esperanta universitato. Laŭ la projekto, la Monda Universitato disponigos al e-parolantoj kiel eble plej multnombrajn kursojn pri la plej diversaj branĉoj de la homaj konoj. BEL elektas nomojn el la plej elstaraj geesperantistoj de la tuta mondo por kontribui ne nur al la finpretigo de la propra projekto, sed ankaŭ por partopreni en la estonta etato de la institucio. Monda Universitato respondos, per si



mem, al unu el la plej gravaj demandoj pri Esperanto, nome, pri ties utileco. Provizoran paĝon <www.esperanto.org.br/mu >. Al tiuj, kiuj emas fari sugestojn pri la projekto, estas petata

kontakti D-ron Saliba per la adreso <mondauniversitato@astrale.com>, kopie al <bel@esperanto.org.br>

**TURISMA BROŜURO**

La Autonoma Registaro de Katalunio ĵus eldonis turisman broŝuron. Ĝi estas 16 paĝa, tre bele ilustrita, grandformata kajero (45 X 35 cm) en kvin lingvoj, inter ili Esperanto. Mendu senpagan ekzempleron ĉe jena adreso: S-ino Cap de Secció de Publicacions. Direcció General de Turisme. Generalitat de Catalunya. 08080 - BARCELONA: mllanos@correu.gencat.es

**ARGENTINA RETKURSO**

Kvar monatojn post la interrreta apero de kurso de esperanto por hispanparolantoj, pli ol 800 personoj vizitis ĝin. Ĝi estas tute senpaga kaj konsistas el 15 lecionoj

www.institutoesperanto.com.ar

**KIEL INSTRUI AMASE ESPERANTON**

Laŭ ideo de Ramón Maynou, en la utopia situacio de instrui amase esperanton en la lernejoj, ni devas proponi la saman metodon kiu uziĝis por la instruado de muziko en la komenco: la instruisto devas samtempe lerni kaj instrui al la gelernantoj.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

18a-19a majo. Kongreso de la Valencia E-Federacio kaj Murcio. Vall d'Uxo (Castellón).

http://www.infonegocio.com/augustocasquero

1a-7a julio. Internacia SAT-kongreso. Alicante.

11-17 julio. HoRo. Hispana Renkontiĝo (HEJS). Salamanca.

http://www.infonegocio.com/augustocasquero

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Bazaj kursoj:

ESCUELA POPULAR DE PROSPERIDAD. Instruas Toni Cebrián. Luis Cabrera 19. 28002 Madrid. Tel. 91 562 70 19. Merkrede 20,00-21,30 horo

Kurso por triaaĝuloj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18.

Prelegoj: 13 majo lumbildoj "Cirkaŭaĵoj de Madrido".

17 majo vendredo "Tibet, un país en el exilio", Lupe komentos lumbildojn ĉe Casa de Guadalajara. Plaza Santa Ana 15. 19,30 h

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
**San Alejandro 6-4ºB. Ext**
**28005 Madrid**
Asociación de Utilidad Pública Municipal